Meze de maro de sango ĉu povas la floroj naskiĝi?  
Tiel la sorto kruele lin frapis, nek estis la venko  
La rekompenco de lia juneco de li fordonita,  
La ĉielarko brilanta post la uragano terura.  
Sed malesperi neniam ni lernis de lia ekzemplo,  
Kaj pli favoraj epokoj revenos por nia afero.  
Povu, ho, lia spirito revidi surmonde la pacon,  
Kiu al ĉiu popolo certigu por ĉiam la rajton.  
Ni rekomencos labori kuraĝe por la idealo.  
Sur lia tombo ni larmojn ne verŝu nek vane plendadu,  
Faru ni ion pli dolĉan al li, al la Majstro amata,  
Faru ni ĉiuj promeson: La sorto terure nin batos,  
Tamen tre alte ni ĉiam la verdan standardon tenados.  
Majstro, ho Majstro, ne mortos jam nia bravega anaro.

— B. M. ("Paco kaj Justeco," Bruĝo, Belgujo)



# LA ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN LA POSTMILITA MONDO

W. SOLZBACHER

Bone konata Esperanto-pioniro en Nederlando, S-ro P. H. Schendeler en Eindhoven, kiu iam estis Ĝenerala Sekretario de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista), nun disvastigas projekton de *Esperanto-Mond-Organizo* (EMO), kies celo estus unuigi ĉiujn Esperanto-asociojn kaj grupojn, neŭtralajn kaj fakajn. La propono similas tiun, kiun oni jam realigis en Francujo, kie nun ekzistas anstataŭ la antaŭaj multoblaj asocioj, unu sola UEF (*Unuiĝo Esperantista de Francujo kaj Kolonioj*), kiu entenas "fakojn" por laboristoj, instruistoj, komercistoj, katolikoj, protestantoj, judoj, radio, junulargastejoj, ktp. Ni sendube ankoraŭ legos kaj aŭdos multajn proponojn por la "unuécigo" de la Esperanto-movado. "Unueco donas forton," kaj "kune ni venkos," dum ke tro granda nombro da malfortaj kaj fuŝe organizitaj asocioj kaj tro granda nombro da fritaj Esperanto-gazetoj, ofte malgravaj, malbone redaktataj kaj aĉe presataj, neniam "atingos la celon en gloro," malgraŭ ilia "longa laboro."

Rigardante la Esperanto-movadon en la mondo, kiu nun malrapide adaptiĝas al la paco kaj, ni esperu, al daŭra kunlaboro kaj reciproka respekto inter la nacioj, ni vidas, ke inter la *internaciaj* organizaĵoj IEL (*Internacia Esperanto-Ligo*) travivis la militon sukcese kaj sane. La Jarlibro kaj la gazeto "Esperanto Internacia" aperis regule, kvankam en malgranda formato. La servoj de la Delegitoj estis daŭrigataj tiom, kiom la kondiĉoj de la milito kaj de la cenzuro permesis. Ni tamen ne forgesu, ke la sukceso de IEL estas ŝuldata preskaŭ ekskluzive al la britaj samideanoj. En ĉiuj militaj jaroj, ankaŭ en 1944, pli ol la duono de la mem-

broj de IEL estis britoj. Laŭ la financa vidpunkto la brita faktoro estis eĉ pli grava, ĉar granda plimulto de la Patronoj, Dumvivaj Membroj kaj Membroj-Subtenantoj estas britoj. IEL preskaŭ fariĝis fako de BEA (Brita Esperantista Asocio). Post la reveno de la paco tio iom post iom ŝanĝiĝos, kvankam politikaj cirkonstancoj kaj la malfacilaĵoj de transpago de mono de unu lando al alia restos ankoraŭ por longa tempo seriozaj baroj al plena efikeco.

UEA (*Universala Esperanto-Asocio*) ne estis same sukcesa kiel IEL en la daŭrigo de sia laboro. En la unua parto de la milito, kiam Ĝenevo estis ankoraŭ grava internacia centro, UEA organizis efikajn servojn. Mi scias el mia propra sperto, ke Esperantista Interhelpo bone funkciis kaj helpis Esperantistajn militviktimojn. Ankaŭ la subteno al la familio Zamenhof estis bone organizata. La gazeto "Esperanto," fondita de Hector Hodler kaj Edmond Privat en 1905, aperis ĝis 1942. Kiam la Hitler-armeoj okupis la sudon de Francujo, Svisujo fariĝis sieĝata fortikaĵo. UEA estis izolita de la ekstera mondo kaj devis ĉesigi publikigon de la gazeto kaj fermi la oficejon. S-ro Hans Jakob, Administranto de UEA, akceptis postenon en ŝtata oficejo funkcia en Palais Wilson (iama sidejo de la Ligo de Nacioj), tiel ke UEA almenaŭ konservis sian impresan adreson. Elvenis kelkaj numeroj de ciklostilita "Informa Bulteno," kaj ŝajnas, ke nun la agado estas reorganizata kaj "Esperanto" reaperos.

En 1941 "Esperanto" (N-ro 490) enhavis artikolon pri "la re-unuecigo de la Esperanto-movado." Ĉi presis leteron, en kiu UEA proponis al IEL, ke por la daŭro de la mi-

lito la du organizaĵoj eldonu komunan Jarlibron kaj komunan gazeton. Mi ne scias, ĉu io tia estus ankoraŭ farebla. Sendube la ekzisto de du Delegito-sistemoj kaj du Jarlibroj neŭtralaj estas malŝparo de energio kaj mono. La Delegito-sistemo estas simila al telefon-reto. Telefono estas vere utila nur, se oni povas atingi per ĝi grandan nombron da personoj, kiujn oni devas aŭ volas kontakti. Eĉ tiuj, kiuj forte kredas je la utilo de konkurenco en la ekonomia vivo, scias bone, ke ekzisto de du konkurencaj telefon-retoj estus senencaĵo.

En la pasintaj jaroj kelkaj el la disputobjektoj inter IEL kaj UEA perdis sian gravecon. La Esperantistoj ne plu multe interesigas pri la jura konflikto, en kiu svisa tribunalo decidis kontraŭ la ekskomitatoj de UEA, kiuj fondis IELon. La plifortigo de la internacia Esperanto-movado, kiu, laŭ la espero de multaj, devis esti la rezulto de kunfandiĝo de internacia serva organizo kun ligo de naciaj propagandaj asocioj, ŝajnas nun iom duba. Fakte nur en Britujo, Francujo kaj Brazilo la naciaj asocioj ankaŭ administras la IEL-aferojn. En ĉiuj aliaj landoj la Ĉefdelegitoj de IEL agas preskaŭ ekzakte en la sama maniero kiel la Ĉefdelegitoj de UEA. Ilia kunlaboro kun la naciaj asocioj ĝenerale ne estas pli intime ol antaŭe, kiam UEA havis sendependan internacian organizon. Laŭ la financa vidpunkto la Asociaj Membroj ne estas granda helpo.

Aliflanke la argumento de UEA pri la graveco de la urbo Genevo kiel internacia centro perdis multe de sia antaŭa pravenco. Genevo restos grava kiel sidejo de la Internacia Ruĝa Kruco kaj de aliaj internaciaj organizaĵoj, kaj ĝia geografia situacio restos favora. Tamen estas nun preskaŭ certe, ke la nova mondorganizo de la Unuigitaj Nacioj havos

sian centrejon ne en Genevo, sed en San-Francisko. Kiel Usonanoj ni estos ĝojaj kaj fieraj pri tio, kvankam kiel Esperantistoj ni scios, ke en San-Francisko ne ekzistas tiel forta Esperanto-movado kaj tiel granda nombro da eminentuloj Esperantistaj aŭ favoraj al Esperanto kiel en Genevo. Se ili ne ekzistas, oni devas krei ilin, diros niaj fervoruloj. Ili estas pravaj. Kaj la ĉefa respondeco por tio falos sur la Esperantistojn de Nordameriko, sur EANA, kaj sur la propagandlaboron de nia gazeto "AE."

Ŝajnas, ke mi vagis for de mia temo al alia temo. Tamen por ni Esperantistoj en Usono kaj Kanado la du temoj estas rekte interligataj. Ni bezonas fortan internacian Esperanto-asocion, ne nur por organizi praktikajn servojn, eldoni dikan Jarlibron kaj disvastigi novaĵojn pri la movado, sed ankaŭ por plani kaj realigi grandskalan propagandon en la internacia vivo. En la estonteco multaj centropunktoj de la internacia vivo troviĝos en la okcidenta hemisfero, speciale en Usono. Por ludin rolan en tiuj novaj cirkonstancoj, ni bezonas pli grandan, pli fortan, pli aktivan Esperanto-movadon en Nordameriko, pli multajn membrojn por EANA, pli multajn abonantojn por AE. Por sukcese labori por la enkonduko de Esperanto en internaciajn organizaĵojn, ni bezonas eĉ pli bonan AE, efikajn librojn kaj broŝurojn, aktivajn komitatojn, laŭsisteman agadon, intiman kunlaboron inter EANA, la tutmonda Esperanto-movado, kaj la Esperanto-asocioj de aliaj gravaj landoj.

Mi volas nur aludi unu delikatan problemon de la movado: la problemon de la rusaj Esperantistoj. Ili estas multnombraj, kaj ili estis tre aktivaj ĝis antaŭ dek jaroj. Neniu organizo ŝajnas ekzisti nun en tiu lando, en kiu oni unue malpermesis la neŭtralan Esperanto-movadon, poste

la SAT-movadon, kaj fine ankaŭ la *Sovetlandan Esperanto-Unuiĝon* (SEU), kies gvidantoj ŝajne fariĝis politike suspektaj. Oni aŭdis multe da onidiroj pri la kaŭzo, sed oni ne konas solidajn faktojn. Se Esperanto volas sukcesi en la internacia vivo, estas necese, ke Rusujo helpu kaj ke la rusa Esperantistaro kunlaboru — en ia maniero. Ni esperu, ke ankaŭ por tiu problemo solvo estos trovata.

Pri la fakaj Esperanto-asocioj mi intencas diri ion en alia artikolo.

Ili estas gravaj, sed devus eviti malfortigon de la neŭtrala movado en la ĝenerala laboro por Esperanto.

Estas multaj metodoj por efektivigi unuecon. Serĉi la plej bonan, estas tasko de la gvidantoj. Sed la plej grava afero estas, ke ĉiu Esperantisto klopodu kompreni la necescon de inteligenta, sistema kaj persista kunlaborado. La 15a de Decembro, 86a naskotago de D-ro Zamenhof, donos al ni specialan okazon pensi pri tiu devo.

## PLENKRESKAJ CIVITANOJ DE LA MONDO

RAYMOND GRAM SWING

La artikolo de la fama radio-komentisto estas disvastigata de la asocio "Amikoj de Demokrateco" (Friends of Democracy, Inc.). Ĝi montras, ke ĉiuj homoj senescepte nun havas la devon interesiĝi pri mondaferoj.

Via prapatro, kiu vivis antaŭ multaj jarcentoj, antaŭ la tagiĝo de la historio, estis respondeca nur pri sia familio. Lia pranepo havis pli grandan respondecon kaj pli grandan avantaĝon, estante civitano de vilaĝo. Vi mem grandiĝis kiel civitano de via urbo, via ŝtato kaj via nacio. *Nun io nova estas aldonita:*

En la venonta paco vi kaj ĉiu Usonano estos civitano de la mondo, restante samtempe civitano de Usono. Tio signifas, ke ni ĉiuj devas esti kapablaj porti respondecon pri mondaferoj. Tiel ni pagas por niaj novaj avantaĝoj, same kiel tiu malnova prapatro pagis per respondeco por la avantaĝoj, kiujn li ĝuis kiel civitano de vilaĝo.

Ni estos parto de mondo, kiu estos regata de la potenco kaj metodo de *interkonsento*. Kiel civitanoj de la mondo ni devas kompreni la necescon de interkonsento kun aliaj nacioj. La rajtoj kaj opinioj de aliaj estas same gravaj por ili kiel viaj estas por vi. Ni devas renkonti la

aliajn naciojn je la duono de la vojo.

Ni jam sentis en nia vivo la mondproblemojn. Kio okazis en la Malaja Duoninsulo kaj en Nederlanda Hindujo, fariĝis sentebla por ni per la manko de kaŭĉuko. Ni trovis nin intime envolvitaj en la problemon de la pola registaro kaj en demandojn pri la rajtoj de ordinaraj homoj en la liberigitaj regionoj tra la tuta mondo.

Sed antaŭ ĉio ni devas lerni, ke ĉiuj tiuj problemoj, en mondo de kunligitaj suverenaj ŝtatoj, devas esti traktataj per la metodo de interkonsento. Ni ne plu povas retiriĝi el la ludo kiel kolera infano, kiu diras: "Mi ne plu volas ludi." Diskutante mondproblemojn, ni devas koni tion, pri kio ni parolas. Civitano de mondo de paco devos esti politika kaj ekonomia plenkreskulo. En mondcivitaneco, same kiel en familia vivo, malgrandaj infanoj estas tre amuzaj, sed plenkreskuloj, kiuj agas kvazaŭ ili estus infanoj, estas danĝeraj por si mem kaj por siaj kunuloj.

# LA JARCENTO DE LA ORDINARA HOMO

HENRY A. WALLACE  
*Sekretario de Komercio por Usono*

*Redaktista Noto:* Ĉi tiu estas la unua el tri sinsekvaj partoj de la epoka parolado de Henry A. Wallace. Ĝi estis vaste dissendita dum la milito kiam li estis Vic-Prezidanto de Usono. La tezo estas ankoraŭ tre grava — ja eĉ pli grava nun post la eksplodo de la atoma bombo. Sekretario Wallace bonkore permesis nin represi ĝin esperante.

★

En Usono estas 130 milionoj da viroj, virinoj kaj infanoj kiuj estas en la estanta milito ĝis la fino. Nia amerika popolo estas tute decidinta persisti ĝis tiam, kiam ili povas doni la senkompatajn batojn kiuj certigos plenan venkon, kaj per tio gajni novan tagon por la amantoj de libereco, ĉie sur la tero.

Tio estas batalo inter sklava mondo kaj libera mondo. Ĝuste kiel Usono en 1862 ne povis resti duone sklava kaj duone libera, same en 1942 la mondo devas fari sian decidon por plena venko en unu direkto aŭ la alia.

Dum ni komencas la finajn stadiojn de tiu batalo ĝismorta inter la libera mondo kaj la sklava mondo, valoras la tempo por refreŝigi en niaj mensoj pri la marŝo de libereco por la ordinara homo. La ideo de la libereco — la libereco kiun ni en Usono konas kaj tiel multe amas— devenis el la Biblio kun ĝia eksterordinara emfazo rilate al la digno de la individuo.

La profetoj de la Malnova Testamento estis la unuaj kiuj predikis socialan justecon. Sed tio, kio estis sentita de la profetoj multajn jarcentojn antaŭ Kristo, ne ricevis plenan kaj fortan politikan esprimon ĝis kiam nia nacio formiĝis kiel Federala Unuiĝo antaŭ unu jarcento kaj duono. Eĉ tiam, la marŝo de la ordinara popolo ĵus komenciĝis. La plejmulto ankoraŭ ne povosciis legi kaj skribi. Ne ekzistis publikaj lernejoj en kiujn ĉiuj infanoj povis eniri. Viroj kaj

virinoj ne povas esti efektive liberaj ĝis kiam ili havas sufiĉon por manĝi, kaj tempon kaj kapablon legi kaj pensi kaj diskuti. Tra la jaroj, la popolo de Usono progresis konstante antaŭen en la praktiko de demokrateco. Per universala edukado, ili nun povas legi kaj skribi kaj formi siajn proprajn opiniojn . . .

Se ni mezuras la liberecon per gradoj de nutrado, edukado kaj sinregado, ni povus tre alte taksi Usonon kaj certajn naciojn de Okcidenta Eŭropo. Sed tio ne estus justa al aliaj nacioj kie edukado disvastiĝis nur dum la lastaj 20 jaroj. En multaj nacioj, antaŭ unu generacio, naŭ el dek homoj ne povis legi nek skribi. Rusujo, ekzemple, estis ŝanĝita de analfabeta nacio al legipova kaj skribipova nacio en unu generacio kaj, en la procedo, la ŝatateco pri libereco en Rusujo estis treege plialtigita. En Ĉinujo, la pligrandiĝo dum la antaŭaj 30 jaroj en la kapablo de la popolo por legi kaj skribi estas komparebla kun ilia pliigita intereso pri efektiva libereco.

Ĉie, legado kaj skribado estas akompanitaj kun industria progreso, kaj industria progreso pli-malpli baldaŭ neeviteble alportas fortan labor-movadon. De longatempa kaj fundamenta vidpunkto, ne estas neprogresemaj popoloj kiuj mankas en mekanika konscio. Rusoj, Ĉinoj, kaj la indiĝenoj kaj en Hindujo kaj en la Amerikoj, ĉiuj lernas legi kaj skribi kaj funkciigi maŝinojn ĝuste tiel bone kiel viaj infanoj kaj miaj infanoj. Ĉie, la ordinara popolo estas en marŝo antaŭen. Miloj da ili lernas legi kaj skribi, lernas kumpensi, lernas uzi ilojn. Tiuj homoj lernas pensi kaj labori kune en labormovadoj, el kiuj eble kelkaj estas ekstremaj aŭ nepraktikaj komence, sed kiuj fine solid-

iĝos por efike servi al la interesoj de la ordinara homo.

Kiam la popolo kiu amas libercon marŝas — kiam la terkulturistoj havas oportunon por aĉeti teron je moderaj prezoj kaj por vendi la produktadon de sia tero per siaj propraj organizoj, kiam laboristoj havas oportunon por organizi unuiĝojn kaj kontrakti kune per ili, kaj kiam la infanoj de la tuta popolo havas oportunon por ĉeesti lernejojn kiuj instruas al ili la veraĵojn de la reala mondo en kiu ili vivas — kiam tiuj oportunoj estas malfermitaj al ĉiu, tiam la mondo progresas rekte antaŭen.

Sed en landoj kie la kapablo legi kaj skribi estis akirita lastatempe, aŭ kie la popolo ne havis longan specon en sinregado sur la bazo de sia propra pensado, estas facile por demogogoj leviĝi kaj prostitui la menson de la ordinara homo al siaj propraj malnoblaj celoj. Tia demogogo povas akiri financon helpon de iu riĉulo kiu estas nescianta pri kio estas la fina rezulto. Per tiu subteno, la demogogo povas superregi la mensojn de la popolo, kaj, de kia ajn grado de ilia libereco, konduki ilin malantaŭen en sklavecon. Herr Thyssen, la riĉa germana ŝtalfaristo, mal multe komprenis kion li faris kiam li donis al Hitler sufiĉon da mono por ebligi al li ludi per la mensoj de la germana popolo. La demogogo estas la malbeno de la moderna mondo, kaj el ĉiuj demogogoj, la plej malbonaj estas tiuj, kiuj ricevas financon de bonintencaj riĉuloj kiuj sincere kredas ke sia riĉaĵo verŝajne estos pli sekura se ili povas dungi homojn kiuj havas politikan allogon por ŝanĝi la vojmontrilojn, kaj logi la popolon malantaŭen al sklaveco de la plej malnobla speco. Bedaŭrinde

por la riĉuloj kiuj finansas tiajn movadojn, kiel ankaŭ por la popolo mem, la sukcesinta demogogo estas potenca ĝenio kiu, post kiam ellasita el sia botelo, rifuzas obei ies ajn ordonon. Tiel longe kiel lia sorĉo daŭras, li spitas Dion Mem, kaj Satano estas malligita sur la mondon.

Per la estroj de la Nazi-revolucio, Satano nun penas konduki la ordinaraĵojn homojn, en la tuta mondo, malantaŭen al sklaveco kaj mallumo. Ĉar la tuta vero estas ke la perforto predikata de la Nazi-anoj estas la religio malluma de la diablo mem. Tiel ankaŭ estas la doktrino ke unu raso aŭ unu klaso estas pro heredeco supera, kaj ke ĉiuj aliaj rasoj aŭ klasoj estas supozataj esti sklavoj. La kredo je unu Satano-inspirita Fuehrer, kun liaj Quisling-uloj, liaj Laval-uloj, kaj liaj Mussolini-uloj, liaj "gauleiter"-kreitoj en ĉiu nacio en la mondo, estas la lasta kaj fina mallumo. Ĉu estas ia plivarmega infero ol tia, nome: esti Quisling-ulo, esceptinte se estas tia, nome: esti Laval-ulo.

En tordita senco, estas io preskaŭ grandioza en la figuro de la Super-ega Diablo funkcia per homa formo, en tiu Hitler kiu havas la aŭdacon por kraĉi rekte en la okulon de Dio kaj homo. Sed la Nazi-sistemo havas heroan pozicion por nur unu estro. En difino, nur unu persono estas permesita reteni plenan suverenecon super sia propra animo. Ĉiuj la ceteraj estas marionetoj — ili estas marionetoj kiuj estis mense kaj politike malnobligitaj, kaj kiuj sentas ke ili povas kvitiĝi kun la mondo sole kiam ili mense kaj politike malnobligas aliajn homojn. Tiuj marionetoj estas vere psikopatiaj kazoj. Satano liberigis la frenezajn sur nin.

(*Daŭrigota*)

## LA SEKRETO DE LA ARTISTO

PAULINE KNIGHT

Iam estis artisto kaj li pentris bildon. La artisto kolorigis sian bildon kun mirinda heleco. Preterpasantoj rimarkis kaj diris: "Plaças al ni la bildo. Plaças al ni la brileco." Aliaj personoj demandis: "Kie li trovis sian koloron? Ĝi estas tre viva!" La artisto duon-ridete respondis: "Ha! tion mi ne povas malkaŝi al vi." Kaj li daŭrigis la laboron.

Junulo vojaĝis al la oriento, kaj el multekostaj pigmentoj li faris ravan koloron kaj pentris bildon. Sed post nelonge la bildo senkoloriĝis. Alia artisto avido legis malnovajn librojn, kaj eltrovis viv-riĉan koloron. Sed kiam li ĝin aplikis, ĝi estis malhela kaj senviva. Li ne sukcesis.

Dume la artisto laboradis. Sub

ĉiu streko la bildo pli kaj pli ruĝiĝis, dum li paliĝis pli kaj pli. Fine, ili ektrovis lin mortinta antaŭ unu el liaj bildoj. Ili preparis lin por la enterigo. Zorge ili serĉis en la kruĉoj kaj kolor-potoj kaj trovis nenion nordinaran. Kie li trovis la unikan koloron? Kiam ili senvestigis lin, ili vidis sur la maldekstra parto de la brusto malgrandan vundon, kiun li posedis eble dum sia tuta vivo, ĉar la randoj estis malnovaj kaj malmolaj. Sed *La Morto*, kiu sigelas ĉion, kunmetis la randojn kaj fermis ilin. Ili enterigis lin. Sed scivolaj personoj ankoraŭ demandis: "De kie li akiris sian koloron?"

Tempo pasis. Dume la artiston oni tute forgesis, sed liaj bildoj daŭre vivas.

---

### Friendly Tips for Students:

1. Today's Special: You find a number of words ending with the suffix "-ig-" plus the verb ending. This is one of the most widely used of all suffixes. It forms both verbs and adjectives, and also can be used alone. The meaning? "igi" (to make, to cause), thus: *kolorigi* (to make colored, to color); *senvestigi* (to cause to be without clothes, to undress); *enterigi* (to cause to be in the earth, to bury); *enterigo* (burial). Do not confuse "-ig-" with "-iĝ-" (to become). You'll find both in the story.
2. Important word: The word *scivolaj* means curious; *scii* plus *volas* makes *scivolas* (wants to know). And to translate English: *I wonder where my husband is*, we would say *Mi scivolas kie mia edzo estas*. Never use *mi miras* to translate *I wonder*, unless you mean *to marvel, be surprized at*.
3. Note the prefix "ek-" in the word *ektrovis*. This prefix denotes sudden or momentary action: *ektrovis* (suddenly found); *krii* (to cry), *ekkrii* (to exclaim); *dormi* (to sleep), *ekdormi* (to fall asleep).

## EL ESPERANTO-LANDO

*Esperantistoj aktivaj en la movado por junulgastejoj* (youth hostels) interrilatu kun S-ro Albault André, Foyer des Auberges de Jeunesse, 12 Avenue J. Jaurès, Reims, Marne, Francujo. Li diras, ke Esperanto estas multe disvastigata en la Franca Movado de Junulgastejoj kaj ke la Franca Movado intencas fondi Internacian Junulgastejon, en kiu Esperanto multe utilis.

*En Nederlando oni intencas reeldoni la gazeton "Heroldo de Esperanto."* S-ro Teo Jung ankoraŭ vivas en Scheveningen.

*Profesoro Frank Tomich*, Klevelando, Ohio, donas paroladon pri "La Esperantaj Lingvoj kaj Movado en Usono kaj la Mondo" antaŭ siaj studentoj de la lingvoj germana, franca, kaj hispana. Li regule enmetas Esperanton en ĉiujn siajn temojn. Bonega ekzemplo por aliaj profesoroj.

*Tutmonda Katolika Adresaro* 1946 aperos akurate je la 1a de Januaro, laŭ anonco de la eldonisto, S-ro Lorcán O hUiginn, Sonas, Cnoc na hInneona, Dundroma - Dublin, Irlando. Katolikaj Esperantistoj sendu al li tuj siajn adresojn, koresponddezirojn, kaj indikojn pri ilia partopreno en katolika agado, kun 2 respondkuponoj. Ili ricevos la adresaron entenantan ilian nomon.

*Pri la rusa Esperanto-movado* aludis intervjuo en "O Globo," ĉiutaga ĵurnalo en Rio de Janeiro, Brazilo, kun S-ro Roberto das Neves, profesoro de Esperanto ĉe la Kristana Unuiĝo de Junaj Viroj (YMCA). Li parolis, inter aliaj aferoj, pri vizito farita de Kapitano Nekrasov, Prezidanto de la Unuiĝo de Sovetaj Esperantistoj, al la kursejo. Oni ŝatus ricevi pluajn detalojn pri tio. Ni ĉerpis la informon el "O Brasil Esperantista." Ni esperas, ke la rusaj Esperantistoj baldaŭ reaktivigos.

*Joseph R. Scherer*, ŝatata Eks-Prezidanto de EANA, el siaj multokupitaj tagaj ĉiam trovas tempon por esperantistigi kaj helpi al la Centra Oficejo (ĉio ĉi tio estas krom loka aktiveco). Ĉiam li subtenas ĉiumaniere.

*Profesoro Christaller*, germana membro de la Esperantista Akademio kaj aŭtoro de bonaj Esperanto-vortaroj, ankoraŭ vivas en Stuttgart, laŭ informo ricevita de "Svisa Espero."

*La kono pri Esperanto multe kreskas en Usono* — tiel asertas S-ro Alfonso Correa, eminenta Brazilano nun en Usono (dum vizito al la Centra Oficejo). Li diris: "Kiam mi unue venis al Usono, estis mia kutimo demandi al iu ajn eminenta persono kiun mi renkontis: 'Kion vi opinias pri Esperanto?' Antaŭ tri jaroj, nur du personoj el dek sciis ion pri Esperanto, sed nuntempe kiam mi demandas, mi trovas ke nun kvin el dek personoj almenaŭ aŭdis pri Esperanto. Nun ni laboru por ke dek el dek sciuj pri Esperanto."

*Esperanto rilate al onomatopeo!* "Mi volas eksperimenti pri tio," diris S-ro J. H. Furay. Li demandis al si, ĉu la interlingvo povas esprimi la ritmon de galopanta ĉevalo. "Ni vidu: Galopanta ĉevalo kuregas, rapidas laŭlonge de strato de urbo, kaj inter la arboj de parko." "Bone," li konstatis: "Nu, supozu ke ne estas ĉevalo sed ĉevaleto, trotante aŭ marŝante. Mi scivolos ĉu la pli rapida ritmo estas esprimebla. Ni provu: Ĉevaleto rapidetas sur la stratoj de la urbo, en la parkon, kaj laŭlonge de vojetoj, inter arboj, atingante ĝis herbejo, paŝetante tre vivege, tia ritmo, tia tinto-tinto-tinto estas sole bagatelo, tiel diris Sinjorino D. Konoro! Hŭo-u! Haltigu tiun ĉevaleton! Ĝi estas forkuronta!" Sed vere, S-ro Furay, havas ion tie por poetoj.

## ESPERANTO-KRONIKO

*Arthur Godfrey* kantis *esperante* kaj priskribis Esperanton en sia programo de la "Columbia Broadcasting System," la 23an de Oktobro. S-ro Godfrey estas tre populara kaj bonhumora majstro de ĉiutaga dissendo tutusone. Li kantis du strofojn de "Hejm' sur la Step'" en Esperanto. Vivu S-ro Godfrey!

*Robert Blackstone* kaj *Joy Postle* prezentas tre belan kaj unikajn programon antaŭ kluboj, societoj, ktp, tra Usono. Ĝi konsistas de tre arta kaj aloga pentrado kaj priskribo pri la kolorplenaj birdoj de la Amerikoj (fenikoptero, egreto, ibiso, plataleo, ktp.) Joy Postle pentras en plena koloro antaŭ la okuloj de la aŭskultantaro. Ili presis tre belan libron, kolorplenan — kun birdoj, poemoj, priskriboj, kaj interesajoj je malgranda prezo. Sendu unu dolaron por du belegaj libroj, "Glamour Birds of the Americas" al niaj Esperantist-artistoj: *Postle & Blackstone, 162 Madison Ave., Daytona Beach, Florida.* La belegaj libroj estus bonegaj donacoj je la Kristnaska Sezono.

*Pauline Knight*, Sekretariino de la Esperanto-Interlingvo-Asocio, kaj Ĉeinstruistino en Nov-Jorko, ĉiam progresigas Esperanton ĉiumaniere. Ŝi estris la Esperantan radio-programon ĉe Stacio WABF je la 19a de Oktobro, dum malsano de Doris Connor.

*Westley S. Burnham*, bone konata Esperantisto de Nov-Jorko, jam de longe subtenis Esperanton ĉiumaniere laŭeble en sia okupita vivo kiel grava agento de la "New York Life Insurance Company." Li posedas tre allogan kaj belan domon en la montaro, kiun ni vizitis ĉi-somere. En antaŭaj jaroj li estis Delegito pri Asekuro en Nov-Jorko — kaj ni povas certigi ke problemoj pri asekuro ricevus tre helpeman servon ĉe li.

*S-ro Kaare Mybr* de Kongsberg, Norvegujo, radio-oficiro de la Norvega ŝipo "M. S. Torrens," vizitis la Centran Oficejon. Li deĵoris surŝipe en la Pacifiko dum la milito, kaj nun okupas sin pri transportado de Usonaj trupoj hejmen.

*D-RO WILLIAM S. BENSON*, mondkonata pioniro de Esperanto, subite mortis en sia hejmo, Irvington, New Jersey, la 20an de Oktobro. Ni ĵus ricevis tiun malfeliĉan novaĵon dum kompostado de la Nov-Dec "AE." Ni presos plenan nekrologon pri D-ro Benson en la sekvonta numero. Sed ni paŭzas malĝoje por rimarkigi la grandan baton al Esperanto pro lia morto. Ĝis la lastaj spiroj li laboris super novaj ilustritaj libroj por antaŭenigi Esperanton. Al la familio ni esprimas kondolencon.

### ELSPEZOJ KAJ ENSPEZOJ DE EANA

31 Julio 1944 ĝis 31 Julio 1945

ELSPEZOJ		ENSPEZOJ	
"Amerika Esperantisto" . . . . .	\$ 550.00	Membro-Kotizoj . . . . .	\$1,221.70
Rentumo . . . . .	180.00	Libroservo . . . . .	798.12
Afranko . . . . .	109.30	Espo-Steloj . . . . .	25.60
Presajoj k Paperajoj . . . . .	58.70	Rentumo Ricevita . . . . .	45.00
Oficejaj Elspezoj . . . . .	73.25	Kontribuoj . . . . .	27.20
Libroj k Steloj . . . . .	482.16		
	<hr/>		<hr/>
	\$1,453.41		\$2,117.62

*Joseph Leaby, Sekretario*



## "THE \$1000 WORKING FUND"

To the Editor of *American Esperantist*:

Harold Ewen's letter regarding the immediate raising of *ONE THOUSAND DOLLARS* to be used as a working fund is excellent, and I hope many readers will feel the way I do about it — that the war is over and it is time for us to really get busy and push our movement for all it is worth.

I am sure that quite a number of Esperantists will not only see that Harold Ewen is relieved of his \$25, but will keep the ball rolling.

I feel so certain that the "five other friends" will come forward with \$25 that I am sending you herewith my check.

— CHARLES RAMSAY

Already four members have responded to Harold Ewen's appeal for an adequate working fund. *Who will be the fifth?* Here are the first four: (1) Viktoro Murajo, (2) E. G. Dodge, (3) "One with the same idea — Miami," (4) Charles Ramsay. They automatically become members

of the *Advisory Committee*.

Other contributions to the \$1000 fund: Peoria Espo-Asocio, \$10; Mrs. D.B. Fuller, "In memory of Mrs. Eleanor B. Salandri," \$5; Herbert Smart, \$5; Lehman Wendell, \$5. General Contributions: Martin L. Winant, F. M. Steadman, \$1 each.

### Contributions Exempt from Income Tax

In accordance with official document of the Treasury Department, Washington, D. C., contributions made to the *Esperanto Association of North America* are deductible by the donors in arriving at their taxable net income. Also bequests, legacies, devises or transfers, to or for the use of EANA are deductible in arriving at the value of the net estate of a decedent for estate tax purposes. (Dated October 17, 1945.)

Now is the time to make liberal contributions to EANA, to put Esperanto on the map. Checks should be drawn to the order of the *Esperanto Association of North America* and sent to the central office at 114 West 16 Street, New York 11, N. Y.

### "Every Subscriber Get a Subscriber"

In addition to the \$1000 fund, *let's double the circulation of "AE."* We can do it! If every reader would get *one new subscriber*, it would tremendously advance our crusade, and solve the present problem of high printing costs for our improved magazine. If our circulation greatly increases, we can have 32 pages, or even a monthly. Then, too, we could get advertisers — which could put us on the *highroad!* Much depends upon *circulation*. "Every subscriber get a subscriber" is a motto put into

practice by Fritz Uhlig. His record stands at 11 new subscribers to date. Others are: Joseph Scherer, Hal Ewen, Bill Vathis, Robt. Karlson, Dr. DeVilbiss, V. Murajo, Jas. Morrison, Robt. Blackstone, F. A. Post, C. E. Peterson, Ted Crawford, Chas. Choquette, Anne Beatty, Etty Graeffe.

Our EANA has largely been supported by *PATRON MEMBERS* and *SUSTAINERS* who deserve recognition in our efforts. The *HONOR ROLL* will be printed in the next issue of AE.

---

## DEZIRAS KORESPONDI

---

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 25 cendojn por 4 linioj. El aliaj landoj, de kie estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncojn senpage. La redaktisto rezervas al si la rajton fini tiun privilegion je iu tempo.

*Danujo.* S-ro E. Windeballe, redaktoro de "Dana Esperanto-Gazeto," Aalokkehaven 24, Odense, deziras korespondantojn por danaj kursanoj.

*Skotlando.* S-ro John Williamson, 12 Bryson Road, Edinburgh, 15 jara, kor, pri lingvoj kaj biciklado.

*Turkujo.* S-ro M. Hulusi, Kurulus 27, Aidin, kaj S-ro Erol Ozmen, 41 Zambak Sokak Taksim, Istanbul, interŝanĝas poŝtmarkojn.

*Bulgarujo.* S-ro K. Tabakov, juna nova Esperantisto, kor. pri literaturo, interŝanĝas poŝtmarkojn kaj naciajn ĵurnalojn.

*Francujo.* S-ro A. Dumarquez, Directeur du Cours Complémentaire, Dèvres, Pas de Calais, serĉas korespondantojn por 15-18jaraj kursanoj.

*Svisujo.* S-ro Petitpierre, 14 rue Chauvet, Genève, dez. korespondantojn por 25 komencantoj 17-40jaraj.

*Svedujo.* S-ro Jack Snarberg, Lillgatan 44a, Jönköping, Dez. kor.

*Argentino.* S-ro Naum Fischman, Pellegrini 752, Necochea. Dez. kor. kaj interŝ. PM.

*Brazilo.* S-ro F. Demacq Rosas, Rua Sanador Feijo 29, Sao Paulo. Dez. kolekti il. PK por venonta brazila kongreso en Sao Paulo.

*Argentino.* F-ino María Chovan, Urquiza 126, Necochea. Dez. kor. pri ĉiu temo.

*Argentino.* F-ino Elba Elizalde, Caseros 64, Necochea. Dez. kor. pri ĉiu temo.

*Francujo.* S-ro Pierce Thomas, Beauthel, Seine-et-Marne. Dez. kor. kun junuloj, pri politiko, literaturo.

*Italujo.* S-ro Edvige Jacobucci de Santis, Via Carmine 61, Brindisi. Dez. kor.

*Svedujo.* F-ino Birgit Svensson, Box 8055, Karlskoga. 19j. Dez. kor. pri danco, kino, muziko, literaturo.

*Francujo.* S-ro Dominiko Perez Guasp, Rue de Rentiers, chez Mme. Ruffie, Tarascon sur Ariège. Dez. kor. por Esp-o grupo.

*Argentino.* D-ino Pilar de Bauchwitz, Str. Alsina 233, Necochea. Nova esp-istino, dez. kor. pri ĉiu temo.

*Nov-Zelando.* Brendon Clark, klubestro, R. D. Makarau via Kaukapakapa, Northland. Anoj de rondo dez. kor. tutmonde.

*Belgujo.* S-ro Fernand Vernimme, Torhoutsteenweg 63, St. Andries, Brugge. Pri historio, literaturo.

*Belgujo.* F-ino Jacqueline Callewaert, Genthofstraat 31, Brugge. Dez. kor.

*Francujo.* S-ro Pierre Boulet, P.T.T. Romans, Drôme. Dez. kor. kun junuloj, 18 ĝis 25 jaroj, pri turismo kaj vivo en ĉiuj landoj.

---

## LANGUAGES OF THE WESTERN HEMISPHERE

(Answers to Quiz on page 127)

1. In the British colony of Trinidad, in the Caribbean, where East Indians form more than a third of the population.
2. In Brazil.
3. This is Papiamentu, a strange mixture of Spanish, Dutch, and other elements, which is the common language on the islands of Curaçao, Aruba, and Bonaire, in the Dutch West Indies.
4. United States, Mexico, Brazil, Uruguay, Argentina.
5. In the Western Hemisphere, about 145 million people speak English, 83 million Spanish, 44 million Portuguese, 8 million French.

## ESPERANTO BOOKS

- PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction .75c
- ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps .25c
- PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations .25c
- UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages \$3.50
- AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion .30c
- LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, by Mario A. Pei, Ph.D., Assistant Professor of Romance Languages at Columbia University. "Should become the standard handbook of the practical linguist . . . an amazing wealth of useful information and advice . . . many times worth its price." (Review in "AE"). A guide to the languages of the world, with a complete Esperanto part. 663 pages. \$5.00
- WORLD LANGUAGE SERIES, edited by Prof. Mario A. Pei. ESPERANTO, by G. Alan Connor and Doris T. Connor, a practical introduction to Esperanto and a systematic vocabulary and phrase-book following the pattern of Professor Pei's famous series. 32 pages. .65c
- 10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE in French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto. 10 languages, including Esperanto, in a nutshell. 110 pages. Cloth \$1.50, Paper .50c
- ESPERANTO GRAMMAR AND COMMENTARY, by Major-General Cox. A very complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. Cloth \$2.00
- SEP VANGOFRAPOJ, by Karlo Aszlanyi. The most recent of the "Epoko Series." Novel translated from the Hungarian. .75c
- "LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings .15c or 2 for .25c
- "LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation. .10c or 3 for .25c
- EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages \$1.00
- STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best. Paper covers .75c
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition, 1945. \$3.50
- STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.
- INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center .45c
- HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.
- "LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto) \$1.25
- "ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns .45c

### YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

### ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

President Truman clearly stated the language problem in an interview in *The New York Times Magazine*, October 14, 1945. When asked how he thought nations could be brought closer together he said: "They must get to know each other better. Each country has its own problems, and something which looms large to one country is of no importance to another. Dislikes and suspicions usually arise from not understanding the other fellow. Getting to know other nations and their getting to know us is necessary for international friendship and cooperation."

He continued: "One of the chief obstacles that stand in the way is a difference in language. And the more two languages differ, the greater the obstacle. The variation in the meaning of words makes for confusion. It is hard to hold conversations through interpreters, for though translations may be literal, nevertheless the intended meanings may be unintentionally distorted . . . "

The Assistant Secretary of State, William Benton, emphasized the gravity of the problem, in the closing sentences of his recent address before the *Herald Tribune Forum*: ". . . we must hope that we shall need to invest less of our resources in military power as we invest more of our thought and attention in the task of mutual understanding. In an atomic age — understanding, not bombs, is the last, best hope on earth."

The ultimate answer to the necessity stated by President Truman and the hope expressed by Assistant Secretary Benton is found in the concept of interlanguage. Esperanto is the living interlanguage created for interchange of thought between peoples of different national languages — not to take the place of their mother tongues. It is the easy neutral bridge-language for all mankind. It is prerequisite to a real solution of the problem.